

Kiel L.L. Zamenhof estis vidata de la komunistoj kaj kiel marksismaj Esperanto-ideologoj limigis la esencon de la ‚interna ideo‘ de Esperanto

Originale verkita en Esperanto de Andreas Kiinzli

Komunismo aŭ socialismo kiel politika, ekonomia kaj socia sistemo precipe en sia leninisma-stalinisma formo grandskale fiaskis kaj homoj, kiuj kredis je tiu ideologio, esence eraris, kvankam ili asertis, ke ili historie pravas. Kelkaj inter ili ja konfesis la bankroton de la marksisma kaj leninisma ideologio, dum aliaj ne ĉesis kredi kaj fidi ĝin. Precipe en Ĉinio, Vjetnamio, Nordkoreio kaj Kubo la marksismo ankoraŭ ne mortis, kvankam ĝi adoptis kapitalismajn elementojn en la ekonomio, kaj servas ĉefe kiel preteksto kaj ilo por konservi kaj defendi la politikan potencon de malgranda grupo de elituloj, havanta preskaŭ dinastiajn dimensiojn kaj sensescepte funkcias kiel kruda diktaturo, al kiu mankas ajna formo de demokrateco.

Kiel montrite en aliaj studoj, la klasikaj ideologoj de la socialismo-komunismo kvazaŭ ignoris la demandon de la internacia helplingvo, kvankam Marx, Engels kaj Stalin ja esprimiĝis pri lingvaj aferoj, sed ne en la senco de planlingvo de la tipo esperanta. Semjon Podkaminer (1901-82) klarigis, ke Lenin plej verŝajne nenion sciis pri Esperanto kaj ke lia edzino Krupskaja eĉ estis kontraŭ tiu lingvo. Stalin, kiu mem esprimis vidpunkton pri la estonta lingvo de la homaro¹ kaj laŭdire iam eĉ lernis Esperanton (nome en la prizono de Bakuo), ordonis persekuti kaj likvidi homojn de certaj grupoj, al kiuj apartenis ankaŭ esperantistoj, ĉar ili havis kontaktojn kun eksterlandanoj kaj estis suspektataj kiel spionoj kaj agentoj.² Malgraŭ tio, en iuj landoj de la komunisma bloko la Esperanto-movado estis reabilitita post la morto de Stalin (1953) kaj eĉ sufiĉe bone prosperis.

Ĉar kun siaj diversaj projektoj, precipe la internacia lingvo Esperanto kaj la homaranismo, L.L. Zamenhof (1859-1917) elpaŝis publike, li ricevis ne nur laŭdon de propraj adeptoj, sed ankaŭ sufiĉe akran kritikon de diversaj skeptikuloj, kiuj ne konsentis pri partoj de liaj teorioj. Kiam en 1906 Zamenhof publikigis sian hilelismmon-homaranismon, tuj aperis forta kontraŭstaro de diversaj flankoj kontraŭ tiu nova propono, en kiu kelkaj el la kritikistoj vidis novan religion aŭ superfluan ideologion, kiu nur ĝenos kaj malhelpos la disvastiĝon de la lingvo Esperanto mem.³ Cetere, longe antaŭ la ĉi-sube menciitaj komunistoj, precipe francaj esperantistoj rifuzis la homaranismon kiel eraran teorion kaj nedezirindan judan mistikon kaj simile. Do, Zamenhof, kiu dum iu periodo laboris ankaŭ por la juda afero (cionismo), estis devigita fari ‚oficialan‘ diferencon inter la homaranismo kaj la lingvo Esperanto, sed li kore kaj cerbe neniam rezignis pri sia granda etika-morala projekto, kiun li vidis intime ligita kun la ideo de la internacia neŭtrala planlingvo, kaj kun la intergenta pacdemando.

La problemo de Zamenhof estis, el la vidpunkto de marksistoj, socialistoj kaj komunistoj, ke li mem ne estis tia. Male, Zamenhof estis kritikata de ili kiel miopa kaj mistikema etburĝa revulo, kiu laŭdire nenion komprenis pri la problemoj de la ekonomio kaj klasoj. Eĉ se li ne estis marksisto aŭ socialisto, oni povus diskuti, ĉu Zamenhof estis almenaŭ maldekstrulo, pri kio ekzistas kelkaj indicoj. Pledanto por paco kaj justeco en si mem jam povas esti konsiderata kiel maldekstra pensulo, kvankam ne ekskluzive, ĉar ne ĉiuj pacaktivuloj estas aŭtomate socialistoj aŭ komunistoj.

En la sekva parte dokumenta studeto interesas min unuavice la reagoj, kritikoj kaj komentoj de elektitaj marksismaj-leninismaj (komunismaj) esperantistoj, de Drezen ĝis Blanke, Aleksiev kaj Murgin, kiuj malfavore rilatis al la zamenhofa homaranismo kaj la ‚interna ideo‘ de Esperanto, kiujn ili aŭ tute rifuzis kiel nemarksismajn teoriaĵojn de etburĝoj aŭ en kiuj ili pretis tamen vidi la ekziston de iuj

¹ Vd. [http://www.plansprachen.ch/Esperanto Stalinismus Sowjetunion 1920-30er.pdf](http://www.plansprachen.ch/Esperanto%20Stalinismus%20Sowjetunion%201920-30er.pdf), ĉaptiroj 2 kaj 3.

² Vd. [http://www.plansprachen.ch/Esperanto Stalinismus Sowjetunion 1920-30er.pdf](http://www.plansprachen.ch/Esperanto%20Stalinismus%20Sowjetunion%201920-30er.pdf), parto 2.

³ Vd. [http://www.plansprachen.ch/Esperanto Russland bis1917.pdf](http://www.plansprachen.ch/Esperanto%20Russland%20bis1917.pdf), ĉaptiroj 2.2.3. kaj 3.2.8.4.1.

pacideoj, kiuj estis utiligeblaj ankaŭ por la bezonoj kaj propagando de la socialismo kaj komunismo. Ĉiuj traktotaj verkaĵoj estiĝis antaŭ 1989, do ankoraŭ en la tempo de la komunisma regado en la koncernaj landoj.

Ernest Drezen:

„Repuŝi plej energie la homaranismon“ de Zamenhof !

La unua signifa komunisma kritikisto de la zamenhofa homaranismo nomiĝis *Ernest Karloviĉ Drezen* (1892-1937),⁴ laŭ etna deveno latvo (Ernests Drēziņš), rusiano, intelektulo-sciencisto, ŝtata funkciulo en Sovetunio, membro de la komunista partio. En la Esperanto-movado, al kiu li aliĝis en 1910, li rolis kiel prezidanto de Sovetrespublikara Esperantista Unio (SEU) kaj famiĝis kiel kontraŭulo de Eŭgeno Lanti de SAT, fondante propran „Internacion de Proleta Esperantistaro“, kaj kiel viktimo de la stalinisma teroro. Kiel interlingvisto Drezen verkis la unikan ‚Historion de Mondolingvo‘ (1931) kaj ‚Ski-zojn pri teorio de Esperanto‘ (1931), kiel movadhistoriisto li kompilis ‚Analizan Historion de la Esperanto-Movado‘ (1931) kaj kiel biografo li skribis bioideologian studon pri L.L. Zamenhof (1929). Pri ĉi-lastaj verkaĵoj temas ĉi tie. Kiel marksisto-komunisto Drezen rifuzis la zamenhofan homaranismon kun la riproĉo al la adreso de la kreinto de Esperanto, ke li atentis nur la lingvajn kaj religiajn aspektojn, sed ignoris la flankojn politikan, ekonomian kaj klasbatalan. Por sia biografia verkaĵo Drezen evidente baziĝis almenaŭ parte sur la libro ‚Vivo de Zamenhof‘ de Edmond Privat, en kiu li legis, ke Zamenhof interesiĝis pri la sorto de subpremataj popoloj, malriĉaj homoj kaj laboristoj. En la membiografio, postlasita de Leono Zamenhof (kaj aperinta en *Universo* 1910), li trovis la informon, ke lia frato interesiĝis pri diversaj sociaj demandoj. Sed tio ne sufiĉis por fari el Zamenhofo plenaloran socian pensulon, kiu venus al la ĝustaj konkludoj. Post analizo de la zamenhofa idearo, Drezen konkludis, ke Zamenhof nenion komprenis pri sociaj kaj politikaj problemoj, ĉar neniu en lia ĉirkaŭaĵo povis klarigi al li la verajn kaŭzojn de la nacia kaj ekonomia subpremado, de la intergenta antagonismo kaj de la reciproka malamo inter la etnoj. Pro tiu nekompreneo de la sociaj problemoj Zamenhof tiris la malĝustajn konkludojn kaj mem kontribuis al tio, ke lia „socia idearo“ ne trovis aprobon kaj estis rifuzita eĉ de granda parto de la esperantistoj. „Do la tuta idearo de Zamenhof estis ligita kun la problemoj pri Lingvo Internacia, kaj tial Zamenhof neniam sukcesis vidi iujn aliajn solvojn por la ‚malbenitaj problemoj sociaj‘ ol tiuj solvoj, kiuj metis sur la unuan planon la ideon pri Lingvo Internacia.“

Pri la ‚interna ideo‘ de la esperantismo Drezen skribis:

„(...) Malsukcesis tiuj sociaj ideoj, kiujn Zamenhof de la komenco mem intime ligis kun sia lingvo. (...).

Sendube erara estis la ĉefa pretendo de la zamenhofa memuaro, ke ‚ne kaŭzoj ekonomiaj kreas la intergentan malamon‘. Ĝuste tiuj kaŭzoj ĝin kreas. La ekonomia konkurado de diversnaciaj financistoj kaj entreprenistoj estas ĉiam prezentata kiel konkurado inter nacioj kaj gentoj. (...)

Same eraris Zamenhof, kiam en 1913 li asertis, ke [la] ‚lingva ŝovinismo estas unu el la ĉefaj kaŭzoj de [la] malamo inter homoj‘.

(...) Blindigita de siaj ideoj, Zamenhof ofte ne povis rimarki la ekzistantajn kontraŭdirojn inter siaj asertoj kaj la vivo reala.

(...) Neniun vorton diris Zamenhof pri tio, ke la lingvo mem estas produkto de certa socio, de certaj formoj de [la] mastrumado kaj de [la] socia produktado. La ideoj pri la lingvo, unuiĝinta kun la nebula ‚interna ideo de [la] esperantismo‘ superregis en [la] menso zamenhofa ĉion alian.

(...) Tial anstataŭ nebula esperantismo li decidis fondi pli klare difinitan filozofie-socian movadon homaranisman.

⁴ Vd. https://eo.wikipedia.org/wiki/Ernest_Drezen.

(...) Tiujn ĉi ideojn zamenhofajn, kiuj kapablas nur fuŝi [la] realan komprenon de la ekzistantaj soci-fortoj, necesas repuŝi plej energie. (...)

Kiel homon, kiu kreis la lingvon Esperanto, la sovetiaj (komunismaj) esperantistoj kaj interlingvistoj ĝenerale admiregis Zamenhofon kiel genion kaj konsideris lin „unu el la plej grandaj viroj de la 19a jarcento“, kiel ekzemple la sovetia soci- kaj interlingvisto Magomet Isaev⁵ nomis lin.

Efim Spiridoviĉ:

La ‚interna ideo‘ de la ‚genia lingvisto venkita de etburĝeco‘ estas ‚senbezona rubaĵo‘

Krom Drezen, meze de la 20aj jaroj komencis enmiksiĝi en la sovetian debaton pri la teorio de la lingva evoluo *Efim Feofanoviĉ Spiridoviĉ (1891-?)*, juddevena ĵurnalisto kaj universitata docento el Belorusio, pri kiu li aperigis tutan serion da artikoloj. Por Spiridoviĉ la historio de la lingva evoluo disvolviĝis en kvar etapoj: Post la etapo de dialektoj sekvis literaturaj lingvoj, kiun sekvas la etapo de la mondhelpingvo, kaj je la fino de tiu ĉi evoluo estos la universala lingvo de la homaro en la epoko de la komunismo. Al la lingvistoj Spiridoviĉ riproĉis, ke ili ne rimarkis, ke kun la Esperanto-movado komenciĝis nova epoko de la lingvoscienco. Pro tio Spiridoviĉ pledis por la neceso plene rekonstrui la lingvosciencan por atingi, ke la nova, marksisma lingvoscienco integre konsideru ankaŭ la teorion de la internacia helpingvo, kiu estos traktita ĉi-sekve.

En *La Nova Etapo*, n-ro 1/1932, aperis interesa artikolo de Spiridoviĉ (reeldonita en Kioto en 1976). Pri la lingva kreado de Zamenhof Spiridoviĉ skribis: „Zamenhof ne restigis sian lingvoteorion en sistemigita aspekto. Li opinias, ke la ĉefaĵo por akcepto de internacia lingvo ne estas teoria pridiskuto de la demando pri ĝi, sed praktika agado. Laŭvere, Zamenhof, ne estante marksano, ne povis science surbazigi tiun ĉi skemon pri [la] evoluo de la lingvo. Pri la ideo kaj socia flankoj de la zamenhofa verko, Spiridoviĉ agnoskis, ke „Zamenhof komprenis, ke ĉiu lingvo estas ‚fakto socia‘ kaj ke la lingvo internacia ne estas escepto. Kiel fakto socia, la lingvo internacia povas esti nur sekvo de bezono pri ĝi flanke de internacia socia forto, por kiu ĝi estus ilo de praktika komuniĝo, organisme devenanta el la tuta evoluhistorio de tiu ĉi forto, el ĝia politika mondkoncepto, el perspektivoj de ĝia disvolviĝo. Unuvorte, tiu ĉi socia forto devas fariĝi portanto de la ideo pri lingvo internacia, siavice devenanta el la evolutendenco de tiu ĉi forto al internacia unuigo de la nacioj kaj al ilia estonta kunfandiĝo.“ Pri la ‚interna ideo‘: „Zamenhof firme konsciis, ke por la definitiva sukceso de lingvo internacia tiu ĉi lasta devas troviĝi en la manoj de tia socia forto, kiu estus unuigita internaciskale ne ekstere, sed formale, per aplikado de tiu ĉi lingvo, sed per iu ‚interna ideo‘, kiun li treege nebule imagis kiel ideon pri ‚tutmonda frateco de popoloj kaj klasoj‘. Venko de la lingvo internacia devus okazi laŭ Zamenhof kiel rezulto de [la] disvastiĝo kaj venko de tiu ĉi ideo. Kia do estas tiu forto, kiu venigos la mondon al unueco? Kiaj devas esti ĝiaj soci-politikaj principoj? Tion ĉi Zamenhof estis neniam kompreninta. Li opinias, ke la esperantistoj, dispolvigitaj tra la tuta mondo, estas jam tiu ĉi socia forto. Vidante, ke inter la esperantistoj, unuigitaj nur ekstere pere de la lingvo internacia, regas diversspecaj antagonismoj – klasaj, naciaj, religiaj – li opinias, ke per predikado de tiu ĉi interna, ĉion paciganta ideo oni povas firme kunforĝi tiun konglomeraĵon de la klasgrupoj, el kiuj estis konsistanta la movado por helpa lingvo internacia. El tiu ĉi devenas lia nelacigebla pacifista predikado pri frateco de popoloj.“ Pri la pseŭdo-religio de Zamenhof, nomata homaranismo: „La praktiko alportis kompreneble al tiu ĉi etburĝa revanto nenion krom disreviĝoj. La burĝaro volonte akceptis la lingvon internacian kiel interligilon, sed restis surda kontraŭ la pacifismaj alvokoj de Zamenhof. La ‚interna ideo‘ en [la] manoj de hipokritaj reprezentantoj de la burĝa Esperanto-movado fariĝis nur mensoga frazo, same kiel ankaŭ ĝenerale la ‚paco‘ en [la] buŝoj de la etburĝaro. Tamen, la milito imperiisma senmaskigis la tutan falsecon de la burĝa pacifismo. Hieraŭaj amikoj, kiuj ĵuris eternan fratecon kaj amon, hodiaŭ transformiĝis je frenezaj malamikoj. Ne helpis tie ĉi kompreneble ankaŭ Esperanto kun sia ‚interna ideo‘. La tuta internacia unueco de la burĝaj esperantistoj disfalis kiel ludkarta dometo. Zamenhof trovis ne-

⁵ Vd. https://eo.wikipedia.org/wiki/Magomet_Isajev.

nion pli bonan ol turni sin al la diplomatoj de la landoj militantaj,⁶ al tiuj ĉi ĉefkomizoj de l'imperismo, kun admonoj ne forgesi pri frateco de la popoloj. Kompreneble, Zamenhof ne ricevis respondon kaj ne povis eĉ ricevi ĝin. Tia estas la tragedio de tiu ĉi homo, kiu (...) ne scipovis elsalti el la kadroj de sia klaso: la genian aŭtodidakton-lingviston venkis etburĝeco.“ Tiel, Zamenhof restis por Spiridoviĉ „homo, ne komprenanta la klasbatalon, sed treege suferanta pro la nacia dividiteco de la mondo“, li estis nur revulo, kiu revis pri la estonta frateco de l'nacioj, sed kiu ne komprenis, „ke tiu ĉi frateco de l'nacioj en la tuta mondo povas aperi nur en rezulto de [la] klasbatalo post [la] definitiva venko de la proletaro en la tuta mondo.“ Konklude: „La plua disvolviĝo de la klasbatalo en la movado esperantista plene evidentigis la tutan erarecon de la etburĝaj opinioj de Zamenhof. Konsekvence: „La proleta movado por lingvo internacia, heredinte la lingvon Esperanto kaj la Zamenhofajn komencetapajn evolu-principojn de la movado por helpa lingvo internacia, tute nature forĵetis la ‚internan ideon‘ de Zamenhof kiel senbezonan rubaĵon.“ Tiel Spiridoviĉ, kiu ja agnoskis la zamenhofan „genian instruon pri helpa lingvo internacia“, dialektike klarigis la neadon de la ‚interna ideo“.

Detlev Blanke:

La ‚interna ideo‘ estas ‚plene idealisma, mistikisma kaj nebula“

En sia eseoj pri la ‚interna ideo‘ de Esperanto de 1979 (aperinta en *Paco/GDR*-eldono kaj represita en hungara eldonaĵo en 1986) la gvida germana interlingvisto *Detlev Blanke (1941-2016)*,⁷ kiu laboris kiel mezgrada kulturfunkciulo de la GDR-ŝtataparato, skribis, ke „Zamenhof ne povis kompreni, ke la konfliktoj inter la nacioj en Bjalistoko estis sekvo de la carisma kolonia politiko.“⁸ En tiu traktaĵo la orientgermana komunisto kondamnis la ‚internan ideon‘ kiel „plene idealisman“, „mistikisman kaj nebulan“ aferon. En tio Blanke en principo klare heredis la vidpunktojn de Drezen kaj Spiridoviĉ. Tamen, oni ne tute komprenas, ĉu Blanke vere aprobis aŭ rifuzis la ‚internan ideon‘ de la esperantismo entute. Ŝajnas, ke en ĝi li vidis specon de lingvofilozofio, kiun li klopodis en marksisma senco ligi kun la pacideo kaj la laŭdira paciga rolo de internacia lingvo. Kvankam Blanke evidente komprenis, ke la esperantistoj verŝajne bezonas ian ideologion, li postulis de la scienco kaj ekstera mondo „objektivan kaj sobran aliron al Esperanto“. Li dubis, ke „la internacia Esperanto-movado povas permesi al si la lukson, luktante por scienca agnosko en la ekstera mondo, samtempe mistikismi inter siaj membroj“. En tiu ĉi rilato Blanke certe dividis sian opinion ankaŭ kun nemarksistoj. Laŭ li, la Esperanto-movado tute „ne povas permesi al si tiun lukson“, „ĉar la koncepto de la ‚interna ideo‘ baras la komprenon de la veraj kaŭzoj de la interhomaj kaj interpopolaj konfliktoj, militoj ktp. kaj sekve malfaciligas la forigon de tiuj kaŭzoj kaj malfaciligas pro tio vere fruktodonan agadon por la humanismaj idealoj de Zamenhof.“ Krome, ĝi „malfaciligas en la moderna mondo vere efikan argumentadon por la internacia lingvo Esperanto“ kaj „ŝajnigas la adeptojn de Esperanto mistikuloj, sektanoj“. Inter la ĉefaj malĝustaj teorioj esprimitaj en la koncepto de la ‚interna ideo‘ Blanke vidis la aserton, ke la ĉefa kaŭzo por la interpopolaj malamo kaj konfliktoj estas la lingva diverseco (pri la religia diverseco li jam ne volis paroli). La rigardo al la pasinta kaj nuntempa internacia politika vivo klare montrus, „ke ne primare la lingva diverseco kaŭzas militajn konfliktojn, sed la ekzisto de diversaj sociaj klasoj, iliaj malsamaj rilatoj al la produktiloj, la antagonistaj (nesolveblaj) kontraŭdiroj inter tiuj klasoj (=klasbatalo).“ Kaj: „Kiel estas konate, kontraŭdiroj inter imperiismaj fortoj, stimolitaj per profitemo kaj ekspansio (=agresemo) kondukis al la unua kaj dua mondmilitoj. La ĉefa kontraŭdiro nuntempe reganta en la mondo estas tiu inter la agresemaj militemaj fortoj de la imperiismo kaj tiuj de la socialismo kaj aliaj pacemaj fortoj.“ Kiel ekzemplojn de lingvosituacia absurdo li menciis la du germanajn kaj koreajn ŝtatojn, kie „malgraŭ komuna lingvo eĉ samlingvanoj ne komprenas unu la aliajn“, pro ideologiaj kaŭzoj. Krome li avertis, ke „malgraŭ komuna lingvo okazis civila milito en Vjetnamio“. Certe eblus menciigi ankoraŭ aliajn similajn kazojn. Konklude: „Nekompreneco de la veraj movofortoj de la homa socio kaj la malĝusta kulpigo de la lingvaj baroj por la konfliktoj objektivaj signifas forigon de la konfliktigaj faktoroj. Krome la malĝusta imago, ke Esperanto en si mem pro siaj ecoj estas pacigilo,

⁶ Vd. piednoton 11.

⁷ Vd. https://eo.wikipedia.org/wiki/Detlev_Blanke.

⁸ Ho, jes, li tre bone komprenis tion, laŭ mi.

kondukas inter la adeptoj de la lingvo al pasiveco rilate al urĝaj mondaj problemoj kiel batalo por la paco, sekureco, malstreĉigo kaj malarmado. Al la lingvo oni do atribuas iun funkcion, kiun ĝi ne havas. La lingvo ne *kreas sociajn strukturojn*, sed tion faras i.a. la manieroj de la produktado, konsumado, varcirkulado kaj proprieto je produktiloj.“ Tamen, Blanke samtempe ja ne neis la fakton, ke „la lingvo havas influon je *sociaj strukturoj*“. Ŝajnas, ke li estis konvinkita, ke „per ŝanĝo de la internacia lingva situacio (enkonduko de internacia lingvo) ni forigos la kaŭzojn de tiuj konfliktoj, precipe pro tio, ĉar la lingvo revoluciigas la mensojn de la homoj“. Konsekvence: „Estas evidente, ke sociaj movadoj luktantaj por similaj idealoj, kiel ili estis esprimitaj de Zamenhof (paco, justeco inter la homoj), kaj kiuj eventuale povus utiligi Esperanton por siaj internaciaj kontaktoj, reagos skeptike aŭ eĉ ne prenas serioze propagandistojn de Esperanto, kiuj reduktas la konfliktokaŭzojn ĉefe je la lingvaj fenomenoj.“ La marksisma ideologo el orienta Berlino, kiu malgraŭ sia rifuzo de la ‚interna ideo‘ de Esperanto ŝajnis kredi je iuj humanismaj ideoj de Esperanto, finis sian kontribuon jene: „Pro tio kritika rilato kaj aprezo al la humanismaj ideoj de Zamenhof, en la montrita senco, kaj la estimo de tiuj ideoj ne povas malhelpi, sed eĉ utili al la kunkonstruo de paca mondo, por kiu oni ankaŭ utiligu la internacian lingvon Esperanto,“ ĉar „fine nur sur paca mondo Esperanto havas estontecon!“

Permesu personan rimarkon. Ĉu Detlev Blanke, kiu ja estis sendube tre inteligenta homo, vere kredis ĉion tion, kion li mem skribis? Ekzistas duboj. Laŭ mi, li troviĝis en gravaj ideoj konfliktoj kun si mem. Rilate la marksismon, socialismon kaj komunismon li neniam parolis private aŭ eĉ en publikaj prelegoj (ĉefe post 1989) kiel fanatika marksisma ideologo, almenaŭ en la medioj, en kiuj mi renkontis lin. Kiel esperantisto, kiu partoprenis preskaŭ ĉiun pli gravan Esperanto-kongreson, li mem praktike spertis, vivis kaj aprezis la ‚internan ideon‘ de Esperanto, sen kiu la Esperanto-movado ne estus kio ĝi estas (aŭ estis), kvankam kiel interlingvisto li abomenis la propagandon de la fanatikaj esperantistoj.

Zamenhof-percepto kaj -propagando en socialisma Bulgario:

‚Interna ideo‘ kiel „kontraŭ-leninisma pseŭdoteorio kaj erara koncepto“

En 1959 oni festis la 100an datrevenon de la naskiĝo de L.L. Zamenhof. En Bulgario multaj publikaj lokoj (stratoj, placoj, parkoj) ricevis la nomon de Zamenhof, ekzemple en Sofio, Plevno, Varna, Pazardžik, Orjaĥovo, Kubrat, Polski Trâmbeŝ, Godeĉ, Govedarci. En aliaj urboj jam ekzistis Zamenhof-memoraĵoj, ekzemple en Sofio, Kazanlâk, Kubrat, Sevlievo, Jambol, Asenovgrad, Varna kaj la Esperanto-insulo en la Danubo. En Dimitrovgrad estis starigita nova Zamenhof-monumento. En tiu ĉi Zamenhof-jaro okazis en Bulgario 63 memorkunvenoj kun 8625 partoprenantoj. En Sofio Bulgara Esperantista Asocio (BEA) okazigis la centran memorkunvenon en kunlaboro kun la „Urba komitato por la Defendo de la paco“, la „Urba komitato de la Popola Fronto“, la „Klubo de la Kulturaktivuloj“ kaj la Pola Kulturcentro. La festparoladon faris *Nikola Aleksiev (1909-2002)*,⁹ kiu laboris ĉe la sindikatoj kaj povis paroli en ties nomo.

Sed en 1959 oni memoris ankaŭ la 15an jubileon de la „socialisma revolucio“ en Bulgario. Je tiu okazo la prezidanto de la CK de BEA ricevis de la estro de la parlamento la ordenon „Kirilo kaj Metodo, 1a grado“. Post la plena integrado de Bulgario en la socialisman tendaron ankaŭ la bulgara Esperanto-movado estis devigata sekvi tiun vojon de la totalisma unupartia ŝtato, kiu lasis neniun alternativon. Tiel, ankaŭ la propagando de la Esperanto-movado en Bulgario devis adaptiĝi al la stilo de la propagando de la komunisma partio, kun kiu ĝi estis komplete kunvolvita kaj egalŝaltita. Laŭ tiu maniero, okaze de la 100-jara Zamenhof-jubileo la teksto de la editorialo de *Bulgara esperantisto* (n-ro 12/1959) pri „L.L. Zamenhof kaj lia verko“ havis jenan tonon – temas pri frua ekzemplo, kiu ilustras la reguligon de la politika lingvaĵo, kiu devis esti respektata ankaŭ de la bulgaraj esperantistoj:

„Pasis 100 jaroj de la naskiĝo de unu el la plej elstaraj filoj de la homaro, la granda humanisto kaj pacbatalanto, la genia kreinto de la internacia helpa lingvo Esperanto, Ludoviko Zamenhof.

⁹ Vd. https://eo.wikipedia.org/wiki/Nikola_Aleksiev.

L. Zamenhof naskiĝis la 15an de decembro 1859 en Bjalistoko (Pollando) en familio de instruisto de fremdaj lingvoj.¹⁰

Posedante riĉan lingvan kulturon, pacaman koron kaj senteman animon al la homaj suferoj, kaŭzitaĵoj de naciaj malegaleco kaj subpremo, de rasa maltoleremo kaj antagonismo, de religia fanat[i]kismo, de ŝovinismo kaj lingva diverseco, Zamenhof en frua aĝo eklaboris por la solvo de la problemoj pri internacia lingvo, per kio li volis helpi al la homaro vivi en paco. (...)

Sed la granda sukceso de Esperanto en nia lando estas ŝuldata ĉefe al tio, ke la bulgaraj esperantistoj ĉiam bone komprenis, ke ili akceptis kaj ellernis la internacian lingvon por ion alporti per ĝi al nia popolo, al nia lando kaj al la mondo, por starigo de pli feliĉa kaj justa socio, por starigo de daŭra paco inter la popoloj. Sed por tio Esperanto tute ne sufiĉas. Estas necesa firma, scienca, batalema ideologio, forte ligita kun la amasoj, inspiranta kaj gvidanta ilin al venkoplena batalo. Tia ideologio ni havas, ĝi estas la marksismo-leninismo, kaj armitaj per ĝi ni estas certaj, ke finfine en la tuta mondo stariĝos la dezirata socialisma kaj komunisma socio – kiam la revo de Zamenhof kaj de la plejmulto de la esperantistoj por daŭra, paca kunvivado inter la popoloj kaj feliĉa vivo efektiviĝos. Cetere, tio jam estas efektivigita en la landoj de la socialisma tendaro, kie nun oni sukcese utiligas Esperanton por la socialisma konstruado, por la konigo de niaj sukcesoj en ĉiuj sferoj de la vivo en eksterlando, por starigo de daŭra paco inter la popoloj.

Grandega estas la servo de Zamenhof al la homaro, ke li donis al ĝi tian taŭgan instrumenton, kiun oni povas perfekte uzi por senpera, internacia komunikado, en la literaturo kaj en ĉiuj sferoj de la vivo. Kaj ni, esperantistoj, kiuj konscie, sisteme kaj konsekvence batalas kaj laboras por kiel eble plej larĝa disvastigo de Esperanto kiel plenalvora internacia lingvo, estos ĝojaj kaj kontentaj, se ĝi penetras pli profunden en la amasojn. Tion ni devos fari des pli, ĉar kiel diras Lenin: 'Naciaj ŝtataj diferencoj inter popoloj kaj landoj vivos ankoraŭ tre longan tempon, eĉ post efektivigo de la proleta regpotenco en tutmonda skalo'. Ĝuste tio kaj la komuna kaj konstanta strebo de ĉiuj popoloj por starigo de daŭra paco en la mondo, por ĝenerala senarmigo, por malpermeso de la eksperimentoj kun atomaj kaj hidrogenaj bomboj, donas al nia movado pli grandan forton kaj valoron. Vivu la senmorta verko de L. Zamenhof!'

Al la tuta ĝisnuna patriotisma-naciisma Ĥristo Botev-, Vasil Levski- ktp. -kulto aldoniĝis en la bulgara Esperanto- kaj Zamenhof-propagando la komunisma Marks-, Lenin- kaj Georgi Dimitrov-kulto kaj la komplete senkritika traktado kaj glorado de la antifaŝismo, antikapitalismo, socialismo kaj komunismo. En BEA-konferenco en Burgas en 1960 oni vidis en la salono pendi bildojn de L.L. Zamenhof, Leonid Breĵnev kaj Todor Ĵivkov, kiu de 1954 oficis kiel ĉiopotenca estro de la ŝtato kaj komunisma partio de Bulgario. Tiuj integraj elementoj de la politiko formis ŝajne harmonian nerompeblan, neerarivan kaj netuŝeblan ideologian simbiozon, kiu servis kiel bazo por la nova identeco de Bulgario kaj de la bulgara Esperanto-movado, kiun ĝis 1989 dominis la bulgara ŝtata propagando, kiu firme kuntenis la Esperanto-movadon de tiu lando.¹¹

Ankaŭ en postaj jaroj sur la paĝoj de *Bulgara esperantisto* aperis novaj omaĝoj pri la verko de L.L. Zamenhof, kiuj estis plej ofte elpensitaj kaj redaktitaj de Nikola Aleksiev tiel lerte, ruze, perfekte kaj profesie en la kunteksto de la marksismo-leninismo, la laborista movado kaj la pacetoriko de la komunisma partio, tiel ke kiel ekstera leganto oni ne ĉesis miradi. Tia modela artikolo estis ekzemple la kontribuado de Aleksiev okaze de la 113a naskiĝtago de Zamenhof en 1972. Pri la deveno de Zamenhof kaj politika kunteksto estis skribite (*BE* 7-8/1972):

¹⁰ En tiu frazo okulfrapas du detaloj: Kiel naskiĝlando estis nomita Pollando, kvankam en la tiama tempo pola ŝtato ne ekzistis kaj la urbo Bjalistoko apartenis al la rusa gubernio de Grodno. Due oni prisilentis, ke Zamenhof naskiĝis en juda familio. Tiu formulo estis kutima ne nur por la Esperanto-historiografio de la komunisme regataj landoj, sed ĝi estis tipa ankaŭ por la propagando de la tuta Esperanto-movado.

¹¹ Komparu la analogan okazaĵon en Pollando, kiam en la unua Tutpollanda Esperanto-Kongreso post la milito en 1946 en Lodzo oni montris en la kunvenejo kun Zamenhof ankaŭ la bildojn de la stalinisma prezidento Bierut kaj de la ĉefministro Osóbka-Morawski (vd. http://www.planlingvoj.ch/Esperanto_Polen.pdf, p. 78).

„La tuta konscia vivo kaj agado de d-ro Lazaro Ludoviko Zamenhof apartenas al la rusa kaj pola kulturoj (SIC!).

Naskita je la 15.XII.1859 en Rusio, Zamenhof pasigas sian infanan kaj junulaĝon en la pola urbo Bjalistoko, en kiu vivas homoj de kvar nacioj – rusoj, poloj, hebreoj kaj germanoj. La rusa cara registaro aplikas la principon ‘Dividu kaj regu’ kaj incitas la loĝantaron el la diversaj nacigrupoj al furioza nacia malamo. La kontraŭhebraj pogromoj estas socileĝaj fenomenoj de la politika vivo en cara Rusio. Ili vekas ondon de kolero ĉe la reprezentantoj de la rusa kaj internacia demokratia publiko. Fine la venko de la revolucio en Rusio ĉesigas tiun ĉi malhonoran fenomenon kaj el la ideo pri frateco inter la popoloj faras sian praktikan politikon, fidele sekvatan de la soveta registaro ankaŭ nun. (...)“

Pri la rilatoj inter Zamenhof, la marksismo, la laborista movado kaj pacifismo Aleksiev daŭrigis skribi tiel:

„La sentema naturo de la junulo Zamenhof (...) estas profunde tuŝita de la timigaj bildoj de nacia fremdiĝo. Jam en fruaĝo lia tuta estaĵo pleniĝas de arda strebo malkovri kaj forigi la kaŭzojn de tiu ĉi kruela fenomeno. (...) Zamenhof neniam ĉesis pensi pri la problemoj de forigo de la malamo inter la popoloj.

En tiu tempo – la 80aj jaroj de la pasinta jarcento – en la landoj de Okcidenta Eŭropo formiĝas vasta socia movado kontraŭ la milito kiel rimedo por solvado de la internaciaj konfliktoj. Pro la ankoraŭ malforta influo de la marksismo super la laborista movado kaj la demokratiaj medioj, la batalon kontraŭ la milito oni gvidas ne de revoluciaj, sed de etburĝaj, pacifismaj pozicioj. La batalo direktiĝas kontraŭ la milito ĝenerale, ne farante diferencon inter militoj justaj kaj maljustaj.

D-ro Zamenhof troviĝas sub la influo de la pacifismo. Li arde kaj abnegacie¹² laboras kaj serĉas en la historio de la homa penso adeptojn de la ideo pri frateco, egaleco kaj kompreniĝo inter la popoloj. Zamenhof publikigas en rusa lingvo verkojn, en kiuj li analizas la kaŭzojn de la militoj. Li venas al la konkludo, ke la militoj estiĝas pro la diferenco en la religiaj konceptoj de la homoj kaj pro la multaj lingvoj, kiuj malpacas inter si. Zamenhof fariĝas adepto de la instruo de Lev Tolstoj pri [la] neceso de [la] paco kaj amo inter la homoj¹³ sendepende al kiu religio ili apartenas kaj en kiu lingvo ili parolas. En tiu spirito li kreas ankaŭ sian filozofion, kiun li nomas ‘homaranismo’. Estas rimarkinde, ke Aleksiev ne prisilentis la religian faktoron ĉe Zamenhof. Pli supre li eĉ menciis la kontraŭhebrajn pogromojn en carisma Rusio.

Malgraŭ tio, ke Zamenhof ne staras proksime de la ideologio de l’revolucia proletaro en Pollando kaj Rusio, li estas plena de simpatio al la laboristoj kaj aliaj laborhomoj. Li rifuzas akcepti monon por siaj kuracistaj esploroj kaj al multaj homoj donas monon el siaj modestaj rimedoj por aĉeti medikamentojn.

Ĝis la lastaj tagoj de sia vivo (aprilo 1917) Zamenhof ne ĉesas batali plej aktive por la justa afero de la paco el la pozicioj de sincera demokrato kaj humanisto. En sia alvoko ‘Al la diplomatoj’¹⁴ li substrekas, ke daŭra paco en la postmilita Eŭropo povas naskiĝi nur se ĝi estus justa al ĉiuj popoloj, paco sen aneksoj,^{15[14]} estimanta la rajtojn kaj interesojn de ĉiuj nacioj senescepte. En tiu alvoko Zamenhof skribas, ke ĉiu lando apartenas al siaj indiĝenoj kaj civitanigitoj, sendepende de tio, kian lingvon, religion kaj supozatan devenon ili havas; eĉ ne unu nacio en la ŝtato devas havi pli grandajn aŭ pli malgrandajn rajtojn ol la aliaj nacioj.¹⁶

¹² Tipa vorto de Aleksiev, kiu signifas totalan sindonemon, memoferadon favore al iu afero aŭ aliaj homoj.

¹³ Kvankam Zamenhof sendube simpatiis kun tiu rusa filozofo-verkisto, ne ekzistas konfirmo, ke Zamenhof fariĝis adepto de Lev Tolstoj.

¹⁴ Publikigita en 1915 (teksto alirebla sub <http://esperanto-ondo.ru/Historio/242zamen.htm>). Pri la aneksoj Zamenhof ne parolis, sed kiam li skribis pri la refarado de la eŭropa mapo post la milito fare de la diplomatoj, kio povus kaŭzi novan maljustecon inter la popoloj, Aleksiev eble aŭtomate pensis pri aneksoj.

¹⁵ Tio estis la postulo de Lenin.

¹⁶ Ĉi tie sentebblas komparo kun la doktrino de Lenin pri la nacia politiko.

Kompreneble, neniŭ burĝa diplomato eĉ pensis labori pri [la] konstruo de daŭra paco post la finiĝo de la Unua Mondmilito.¹⁷ Devis veni la Oktobra Socialista Revolucio por mobilizi la vastajn popolamasojn en Rusio kaj en aliaj militantaj landoj al batalo por efektiviĝo de la Lenin-slogano 'Paco sen aneksoj kaj kontribuoj!' (...)

Kiam temas pri la meritoj de d-ro Zamenhof antaŭ la progresema homaro, pro kio la Tutmonda Packonsilantaro kaj UNESKO decidis celebri la 100-jariĝon de lia naskiĝo en 1959, plej multe da homoj lin memoras kiel kreinton de la internacia lingvo Esperanto. Malmultaj tamen scias, ke la ĉefa motivo, kiu stimulis lin krei tiun lingvon, estas la arda deziro kontribui per ĝi por forigo de la militoj kaj starigo de eterna paco en la mondo. (...)

En tia fajnigita versio de la prezento de Zamenhof kaj de la esperantismo oni povas rekoni specon de (duon)oficiala, deviga kaj definitiva percepto kaj interpretado de la esenco de la verko de Zamenhof fare de la gvidaj funkciuloj de BEA, kiuj havis la taskon poziciigi Zamenhofon kaj Esperanton en la ĝustan ideologian-politikan lumon kaj kuntekston de la socialismo, por pravigi la (malfacilan) ekzistadon de la Esperanto-movado sub marksismaj-leninismaj kondiĉoj. Tiu interpretado, kiu aperis kvazaŭ kiel ekzegezo, evoluigita en la komunisma laboratorio, estis unika eĉ en la Orienta Bloko, kie eĉ polaj, sovetiaj kaj orientgermanaj Esperanto-komunistoj, kiuj apartenis al la plej fanatikaj propagandistoj kaj kiuj enmiksiĝis kun eĉ pli groteskaj pervertigoj en la historion de la Esperanto-movado kaj en la Zamenhof-biografikon, ne sukcesis forĝi pli trafan formulon. Multaj eldiroj kaj klarigoj de Aleksiev certe estis ideologie ekstreme unuflankaj, spekulativaj, troigitaj kaj interpretitaj preter la efektivaj historiaj realaĵoj kaj la enhavoj de la Zamenhof-idearo, kiu havis absolute nenion komunan kun la socialismo, komunismi, marksismo aŭ kaj leninismo, kun kiu ĝi estis nepermeseble intermiksita. Sed la aŭtoro de tiuj kontribuadoj, do Aleksiev, la grandmajstro de la ideologia manipulado, kiu pretendis la monopolon de la interpretado de la verko de Zamenhof kaj diktis la ĝeneralan tonon en Bulgario, perfekte sciis kiel oni devas skribi la aferojn, ŝajne ĝuis en partiaj medioj (kiuj kutime havis neniun konon pri Zamenhof kaj Esperanto), al kiuj li mem apartenis, altgradan kredindecon kaj akceptecon. Ĉu li havis ĝin ankaŭ en la pli kritikemaj Esperanto-medioj de Bulgario, ne estas konate, ĉar en la publikigita literaturo tiaj sciigoj ne aperis. Aleksiev estis kaj restis speco de sanktulo de la bulgara Esperanto-movado, pri kiu oni neniam kritike skribis, ankaŭ ne post lia morto. Kio koncernas la bulgaran propagandon, kun kiu la Esperanto-propagando estis egalŝaltita kaj kiun BEA perfekte regadis, ĝi estis, ĝuste ĉar ĝi havis la oficialan benon de la registaraj kaj partiaj instancoj en la koncernaj ŝtatoj, tiel forta, potenca kaj influa, ke multaj naivuloj kaj en oriento kaj okcidento kredis ĝin kaj povis esti blindigitaj kaj trompitaĵoj de ĝi.

En 1961 la ,interna ideo' estis de la (bulgaraj) komunistoj ankoraŭ rifuzita kiel kontraŭ-leninisma pseŭdoteorio kaj atakita kiel ,erara koncepto', kiu ,nebuligas la menson de la esperantistoj kaj puŝas ilin al la tendaro de la burĝa naciismo kaj imperiista kosmopolitismo.' Plue en la teksto oni povas legi: ,Tiujn erarajn konceptojn ĝisfundamente neniigas la instruo de Lenin pri nacia problemoj kaj proleta internaciismo, fundamento de la politiko de la Komunista Partio de Sovet-Unio, kiu estas nevenkebla armilo, per kiu la laborista klaso fiaskigas la planojn de la imperiistoj por tutmonda regado.' Ktp.¹⁸ Se oni legas tiajn absurdajn frazojn, oni povus kredi, ke la ,interna ideo' apartenis al la planoj por tutmonda regado kaj ke unu plian fojon oni, t.e. la komunistoj (kiuj estis ankaŭ kontraŭcionistoj) vidis la judojn troviĝi malantaŭ tiuj planoj, ĉar la ,interna ideo' originis ĝuste de judo. Sed la esperantistoj probable ne ĉesis kredi je la ,interna ideo', eĉ se ili estis marksistoj, leninistoj, socialistoj aŭ komunistoj.

¹⁷ Aleksiev neglektis konsideri la fondon de la Ligo de Nacioj, sed li pensis verŝajne pri la ĉefaj ŝtatestroj de la grandpotencoj, kiuj intencis daŭrigi la militon, kompare kun Lenin, kiu postulis fini ĝin. Vd. ankaŭ mian studon sub http://www.planlingvoj.ch/Zamenhof_alvoko_diplomatoj1915.pdf.

¹⁸ *Bulgara esperantisto* 4/1961. Editoriale pri V.I. Lenin, p. 3. En tiu periodo Ĥristo Gorov estis la respondeca prezidanto de BEA (vd. https://eo.wikipedia.org/wiki/Ĥristo_Gorov).



Bulgaraj Esperanto/Zamenhof-poŝtmarkoj de 1957, 1959 kaj 1987.

La oficiala bildo pri Zamenhof iom ŝanĝiĝis sur la bulgara flanko nur en la 80aj jaroj, kiam iom post iom ĝi povis esti liberigita de la socialisma enkadriĝo. Dum Marija Bojadžieva-Jankova en sia disertaĵo ankoraŭ ripetis la teoriojn de E.K. Drezen, laŭ kiuj la ideologio de Zamenhof estis „idealisma“ en la senco de la marksismo,¹⁹ Nikola Aleksiev emfazis ĉe la kreinto de Esperanto antaŭ ĉio ties flankon de „poliglota, naturtalentita“ lingvomajstro.²⁰ Canko Murgin, pri kiu pli detale temas en la venonta ĉapitro, fine gloradis Zamenhofon kiel „apostolon de la bono kaj belo kaj de la vero, progreso, humanismo kaj internaciismo“ kaj komencis malneglekti la judan historion, kiu estis prilaborinda lige kun Zamenhof.²¹

Canko Murgin: ,Interna ideo‘ kiel „esperantista pacifismo estas anakronisma kaj ideologie misgvida“

Inter la pli konataj bulgaraj esperantistoj kaj zamenhofolog elstaris *Canko Petkov Murgin (1921-1995)*,²² kiu estis geografo kaj redaktoro de diversaj bulgaraj Esperanto-periodaĵoj kaj libroj. Li aliĝis al Esperanto en 1938. En 1985 aperis en Sofio kajero kun liaj studoj („Progresemaĵoj en la ideologio de Zamenhof“), inter kiuj troviĝis la artikolo „L.L. Zamenhof pri la ‘interna ideo’ de esperantismo“. Ĝin Murgin nomis „unu el la esencaj komponantoj en la tradicia ideologi-arsenalo de Zamenhof“. En sia studo li celis trakti la demandojn: Kio ĝi estas, de kie ĝi venas kaj kiaj estas ĝiaj funkcioj kaj destino? Laŭ Murgin, Zamenhof „enorme trograndigis la planlingvan influon por [la] solvo de la fundamentaj soci-problemoj en la internacia vivo“. Kaj: „Komence Zamenhof atribuis al la interna ideo efikon de panaceo kontraŭ la sociaj difektoj de [la] kapitalismo. Li supozis, ke paralele al la vastigado de Esperanto en la internacia sfero el ĉiu interkonsiliĝo kreskos firma interkonsentiĝo fare de la nacioj kaj ŝtatoj. La efekto el tiu grandskala kaj stabila interkonsentiĝo estos malebligado de militoj kaj [la] starigo de [la] eterna paco en la internacia vivo. Sekve de tio estos solveblaj ĉiuj aliaj soci-problemoj. Tial la interna ideo estas konsiderata kiel esperantista pacifismo. Sian pacifisman mondkoncepton Zamenhof plej elokvente kaj sinteze esprimis en la poemo ‚La Espero‘,²³ kiu poste fariĝis la himno de la ĝenerala Esperanto-movado: ‚...kompreneble unu la alian la popoloj faros en konsento unu grandan rondon familian‘. Tiel, Zamenhof fariĝis la subtenanto de la interna ideo de [la] esperantismo, [kiu] alivorte estas [la] portanto de specifa pacifisma idealo pri [la] unuigo de la homaro per [la] kreskanta uzado de Esperanto en la internaciaj kaj interŝtataj rilatoj.“

¹⁹ Bojadžieva-Jankova, M.: La bulgara revolucia Esperanto-gazetaro dum la periodo 1929-1934. Sofija 1983.

²⁰ Aleksiev, N.: Pri D-ro Zamenhof kiel poligloto. En: *Bulgara esperantisto* 12/1988, p. 4s.

²¹ Murgin, C.: Pri la naturo de Zamenhova mondkoncepto (1876-1879, 1879-1885). En: *BE* 10/1988, 2/89.

²² Vd. https://eo.wikipedia.org/wiki/Canko_Murgin.

²³ Ĝian tekston vd. sub https://en.wikipedia.org/wiki/La_Espero.

Laŭ Murgin, komence de la 20a jarcento la pozicio de la ‚interna ideo‘ estis subfosita de la kontribuo de [la] laboristaj esperantistoj, kiuj prezentis al la esperantistaro kaj al Zamenhof la problemon ‚milito – paco‘ laŭ scienca vidpunkto. Zamenhof mem, eliminante la analizon de la interna ekonomia strukturo de iu ajn nacio aŭ ŝtato, ne sukcesis ekspliki la efektivajn kaŭzojn de la militoj kaj militismo. Zamenhof konjektis pri sia erar-vagado en 1895, sed nur post diversaj instigoj li komencis ĝin parte superi ekde 1905. Kvankam la agado de Zamenhof por strikta plibonigo de la internacia vivo restis tiutempe preskaŭ sen pozitiva rezulto, Murgin tamen agnoskis, ke tiam la pacideo estis enkondukita en la Esperanto-movadon. Kial 1895 ? Murgin skribis: „En tiu jaro la aŭtoro de Esperanto bilancis la rezultojn de la eventoj dum la mallonga periodo de [la] Esperanto-movado kaj li amare konstatis, ke la paciga funkcio de Esperanto estas ĥimera. Zamenhof atendis [la] starigon de [la] paco inter la nacioj kaj ŝtatoj, sed samtempe li estis ege surprizita pri [la] manko de paco, konkordo kaj kunlaboro inter la esperantistoj mem.“²⁴

Provante periodigi la historion de la ‚interna ideo‘, Murgin karakterizis ĝian pluan evoluon tiel: „La dua stadio de la interna ideo estas mallonga. Ĝi ampleksas [la] daŭron de sep jaroj (1906-1912). Dum tiu periodo Zamenhof starigis tre aplomban pledon favore al la interna ideo, plejparte en siaj kongresparoladoj.²⁵ Dum tiu periodo la interna ideo estas uzata kiel sinonimo de [la] homaranismo. La pledo por la interna ideo aperas haste, preskaŭ subite, ĝi brilas enorme nur dum kelkaj jaroj kaj denove dronas en forgeson. La interna ideo de la dua stadio estas kompleksa kaj komplika, tiam malfacile difinebla. Ĝi ne identas senescepte kun la iama interna ideo, kiu naskiĝis kun Esperanto. Post 1895 la interna ideo estis provizore minacata pro konkurenco fare de tre pretendema rivalo – la hilelismo, detale formulita dum la jaroj 1896-1901²⁶ kaj aperinta libroforme en 1901. Sed ĝi tamen estis efemera kaj nevivipova. La fruan internan ideon, kiu estas esperantista pacifismo, alte ŝvebanta kaj sen reala fundamento, oni aprezas kun pardonema indulgo. Oni eĉ ŝatas romantike ĝin pro tio, ĉar ties apero heroldas ĝenerale pri naskiĝo de la pac-ideo inter la esperantistaro. Ĝenerale tamen la Esperanto-movado kune kun sia interna ideo (esperantista pacifismo) estis ĝis la jaro 1905 unu el la internaciaj movadoj kun progresema tendenco en sia disvolvo. Ĝi ankaŭ aldonis sian modestan kontribuon al la problemo por revizio de la internaciaj kaj interŝtataj rilatoj konforme al la principoj de amikeco kaj frateco, bazitaj sur justeco kaj egaleco inter ĉiuj rasoj kaj nacioj. Tamen, la esperantista pacifismo en la kontraŭ-imperiismaj revolucioj estas politike anakroni[i]sma kaj ideologie misgvida. Tia estas la dialektita esenco de la tiusenca interna ideo. Ĉe Zamenhof la popularigo de la homaranismo (sinonimo de la interna ideo) estas nur etapo en sia esplorproceso dum la serĉado de konvena ideologio por la Esperanto-movado. Post lia morto (1917) iuj sociaj movadoj kaj organizaĵoj spekulis misuzis tiun esplormomenton en la vivo de Zamenhof pro siaj grup-egoismaj konsideroj por propraj utiloj kaj celo.“ La organizaĵoj, kiuj laŭdire misuzis la ‚internan ideon‘ aŭ la pacideon de Zamenhof estis laŭ Murgin Pacifisma Esperanto-Organizo kaj la Esperanto-Societo ‚Konkordo‘ en Varsovio.²⁷ La samon Murgin riproĉis ankaŭ al la juda esperantisto Immanuel Olsvanger,²⁸ samtempe menciante, ke G. Demidjuk „alarmis pri la erara maniero de la traktado de la interna ideo“.

Laŭ Murgin, la veraj heredantoj de la pacideo estas ĉiuj progresemaĵoj, movadoj, organizaĵoj, ŝtatoj. En la Esperanto-movado la ‚interna ideo‘ en sia malnova senco kiel esperantista pacifismo iom post iom transformiĝis al aktiva pacdefendo per konkreta batalo kontraŭ la faŝismaj kaj imperiismaj fortoj pro la preparata nova (dua) mondmilito. Du konkretaj ekzemploj de tiaj organizaĵoj estis laŭ Murgin la bulgara Esperanto-movado, kiu agis sur la platformo de la popolfrota kontraŭ-faŝismo,²⁹ kaj la dua estis Mondpaca Esperantista Movado (MEM),³⁰ starigita en 1953 en Aŭstrio, kiu reprezentis

²⁴ En 1895 okazis granda bato por Zamenhof kaj la juna Esperanto-movado, kiam la revuo *Esperantisto* (kies redaktoro Zamenhof, kiu tiam vivis en Grodno) estis subite malpermesita de la cenzuro en Rusio. Tio kaŭzis ian seniluziigon inter esperantistoj. En korespondajoj kaj artikoloj de Zamenhof de tiu jaro oni rimarkas, ke li konsciis pri la multaj malfacilaĵoj por Esperanto en la pasintaj jaroj, sed malgraŭ tio li ne intencis rezigni kaj restis optimisma.

²⁵ La koncernajn tekstojn vd. sub <http://i-espero.info/files/elibroj/eo%20-%20zamenhof.%201.l.%20-%20paroladoj.pdf>.

²⁶ Laŭ propra indiko de la aŭtoro en la antaŭparolo al la broŝuro pri hilelismo (1901), la ideo naskiĝis en aŭ ĉirkaŭ 1896.

²⁷ Ĉe la varsovia grupo ‚Konkordo‘ temis pri klubo, al kiu apartenis ĉefe familianoj de Zamenhof kaj judaj esperantistoj.

²⁸ Vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Immanuel_Olsvanger.

²⁹ Vd. mian studon pri la bulgara Esperanto-movado sub http://www.plansprachen.ch/Esperanto_Bulgarien.pdf.

³⁰ MEM estis la komunisma pacmovado de la Esperanto-movado. Post la kolapso de la komunismo ĝi estis malfondita.

la progresemajn kaj humanecajn esperantistojn el la landoj de la reala socialismo. Laŭ li, la MEM-anoj estis la legitimaj heredantoj ne nur de la Lingvo Internacia, sed ankaŭ de ĉiu racia grajneto el la Zamenhof-ideologio. Tiel, laŭ Murgin, la ‚interna ideo‘ metamorfiĝis de la esperantista pacifismo al la aktiva pacdefenda batalo kontraŭ la faŝismo, imperiismo kaj kontraŭ ties militarismoj. En la figureco de MEM kaj ties presorgano *Paco* la pac-streba testamento de d-ro L.L. Zamenhof trovis, laŭ Murgin, sian „plej nelacigeblan realiganton kaj perfektiganton“.

Mankas ĉi tie la spaco por detale komenti kaj pridiskuti la suprajn skribaĵojn de tiuj kvin-ses ĉefaj ideologoj de la marksismo-komunismo kaj esperantismo Drezon, Spirodoviĉ, Blanke, Aleksiev/Gorov kaj Murgin, kiuj estis konsiderataj en tiu ĉi studo. Sed el ĉi tiu prezento de dokumentitaj eldiroj eblas konkludi jenon: La marksistoj-komunistoj principe rifuzis la ideologian flankon de la verko de Zamenhof, precipe la homaranismon kaj la ‚internan ideon‘ de Esperanto, ĉar ĝi ne formis parton de la marksisma-leninisma koncepto kaj ne koincidis kun la aktuale validaj leninismaj teorioj. Maksimume la kerna pac-ideo, kiu estis esprimita en la doktrino de Zamenhof kaj de la esperantismo, estis utiligebla kaj akceptebla por ili kaj ilia propagando, kiu uzurpis lian pac-ideon por propraj celoj (kondamno de la kapitalismo, imperiismo, propagandado de la socialismo kaj komunismo, k.s.). En Sovetunio esperantologio kaj interlingvistiko ekzistis kiel neglekteblaj ‚ekzotaj‘ randaj sciencaj objektoj, pri kiuj okupiĝis nur tre malmultaj fakuloj (ĉefe lingvistoj), dum la iom pli amaseca Esperanto-movado estis suspektata kaj malhelpata de la partiaj kaj ŝtataj instancoj (malgraŭ la ekzisto de iuj oficialaj asociaj strukturoj).³¹ En landoj kiel Bulgario Esperanto servis unuavice al la ŝtata propagando (konstruado de la socialismo) kaj estis tolerata kaj flegata kadre de oficiale subtenata kaj kontrolata asocia vivo. Post la falo de la komunismo en orienta Eŭropo (1989/90) la Esperanto-movado ege malfortiĝis en la iamaj socialismaj landoj kaj esence fariĝis la afero de privatuloj, pri kiu la ĝenerala publiko nur malofte aŭdas kaj parolas. Sed ankaŭ neniu plu parolas pri marksismo-leninismo, socialismo kaj komunismo, same kiel ŝajne neniu plu interesiĝas pri homaranismo kaj la ‚interna ideo‘ de Esperanto.

Kio koncernas la percepton kaj receptadon de la verko de L.L. Zamenhof en Bulgario kaj aliaj eksaj socialismaj landoj, ĝiaj rezultoj perdis sian aktualecon kaj fariĝis grandparte neutiligeblaj por la objektiva konsiderado de lia verko pro la krudaj ideologiaj kaj politikaj tordado, mistraktado kaj uzurpado, pseŭdosciencia, spekulativa kaj nepermesebla adaptado kaj misinterpretado de la ideoj de Zamenhof en falsa historia, politika kaj ideologia kunteksto. La materialo ĉi-rilate produkita dum la komunisma tempo povas esti grandparte ĵetita en la rubaĵujon de la historio, kaj necesas reveni al la originalaj fontoj de la origina historia kunteksto. Post la kolapso de la socialismo en Bulgario renovigo de la ‚zamenhofologio‘ kaj ‚interlingvistiko‘ ne okazis, ĉar ne aperis novaj homoj, kiuj volus okupiĝi pri tiuj temoj kaj fakoj. Anstataŭ paroli pri lia judeco, oni daŭre preferas konsideri Zamenhofon ‚pola‘ kuracisto³² ktp. Do, la neelsarkeblaj duonveroj de la Esperanto-propagando havis enorman kaj longdaŭran efikon ĝis Bulgario kaj aliaj landoj kaj damaĝis la realan kaj verajn rigardadon, perceptadon kaj komprenadon. Nek la bulgara nek la internacia Esperanto-movado tiris la ĝustajn konkludojn el la eraroj de la pasinteco, kaj ŝajnas, ke oni ankaŭ ne pretas tiri ilin, aŭ nur duonkore, kun fatalaj konsekvencoj.

© Andreas Künzli 2013, 2017

© www.planlingvoj.ch / www.zamenhof.ch, 2017

La (svisa) aŭtoro, nask. en 1962, studis slavistikon, orienteŭropan historion kaj internacian juron en la zurika universitato. La studojn li finis en 1992 per licencia verkaĵo pri la historio de Esperanto kaj interlingvistiko en Ruslando kaj Sovetunio kaj estis diplomita per la titolo lic. phil. (M.A.). Esperantisto de 1979. Retestro de www.osteuropa.ch (ankaŭ: www.balkan.ch kaj www.slavistik.ch).

³¹ Vd. mian studon sub http://www.planlingvoj.ch/Esperanto_Sowjetunion_nachStalin.pdf.

³² Tiel ankaŭ ĉe Georgi Michalkov sur <https://www.youtube.com/watch?v=D7zwtu3vpsk>.